

ESPERANTO ★ TRIUMFANTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norita, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 160
7. 10. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Buijn, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfanta
Horrem bei Köln, Germanlando.
Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Denove Esperanto kaj L. d. N.

La Ligo ne akceptis la rezolucion de la Intelekta Komisiono koncerne al Esperanto.

UEA komunikas:

El la rezolucioj de la Komisiono por Intelekta Kunlaborado, la sola, kiu ne estas akceptita de la Ligo de Nacioj, estas tiu, kiu rekomendas la instruon de fremdaj lingvoj prefere al artefarita mondlingvo. Sufiĉe granda nombro da delegitoj, inter kiuj Lord Robert Cecil, trovis tiun rezolucion neakceptebla pro la grandaj progresoj de Esperanto dum la lasta jaro; ekzemple en Brazilo, kies delegito kontraŭbatalis Esperanton lastan jaron ĉe la Ligo, la parlamento ĵus voĉdonis leĝon stariganta ekzamenojn pri Esperanto en ĉiuj normalaj lernejoj. Tial la raportinto estis devigata referi la rezolucion de la Intelekta Komisiono.

Tiamaniere Esperanto akiris sian revenĝon kontraŭ la vidpunkto de la Intelekta Komisiono, kiu ne estas akceptita de la Ligo de Nacioj.

(Represo en naciaj gazetoj rekomendinda.)

8-a Itala Esp. Kongreso en Terni, 21.—22. sept.

Ĉe la kongreso estis reprezentataj la registaro kaj la ministerioj por ekonomio, instruado, publika laboro, kolonioj, milito kaj maro. Ĉiuj lokaj aŭtoritatoj ĉeestis la inaŭguron. Urbestro Markizo Masci akceptis la kongreson en urbdoma salono.

Okazis teatro-prezentado honore al la kongresanoj, vizito al la famaj ŝtalfabrikejoj kaj akvo-faloj donantaj al multaj provincoj elektran forton.

La deveno de polur-arto.

La poluro de diamantoj apartenas al la modernaj eltrovoj. La antikvuloj, kiuj la poluron de juveloj disvolvigis ĝis alta perfekteco, ne estis kapablaj poluri diamantojn. Pro tio ili estis devigitaj porti tiujn ornamaĵojn en la natura formo.

La eltrovo, poluri diamantojn per ilia propra materio, okazis en 1476 kaj estas ĝenerale alskribita al Ludoviko van Berken naskiĝinta en Brugge (Flandrujo).

Lia patro, kiu destinis lin je alia profesio, sendis lin al la universitato de Paris; sed Ludoviko estis unu el tiuj pensuloj, kiuj antaŭiras sian tempon per la forto de sia fantazio. Li faris tie ne multan progresadon kaj eluzis sian tempon per amatorajoj kaj eltrovoj, tute ekstere de la ĉirkataĵo de tiu dediĉo, kiu devis interesi la studenton.

La patro sciigis kaj revokis lin hejmen. Kiam li vidis sian filon sian servi de diversaj instruistoj, kiujn li kunportis el Francujo, kaj de kiuj li ne povis kompreni la celon, li lasis lin en plena libereco ellabori lian penson, por ke li povu eltrovi ion.

Tiu patro estis nobla de karaktero kaj granda de animo, li lasis sian filon trankvile. Tiamaniere la filo faris la eltrovon, kiun entenis lia cerbo iam de l' komencoj de liaj studoj en Paris.

Li metis du diamantojn en cementpudron kaj poste froiantu unu al alia ĵ uzas la pudron, kiu estis la rezultato de la frotdo. Por poluri li miksis pudron kaj oliv-oleon, ŝmiris ĝin sur

Raportoj de Itala Esp. Federacio pri dumjara agado kun eminentaj okazintoj (Konferenco en Venezia, publikigo de Propagandaj Kajeroj pri raportoj de L. d. N., Venezia ktp.), plue pri funkciado de librocentro kaj gazetaroŝeĝo, rilatitaj kun la registaro, invito de Universala Kongreso al Milano, estis varme aplaudataj kaj aprobatataj. Oni iom reformis la federacian statuton kaj plenkonsente reelektris s-ojn adv. Vaona, D-ro Toschi kaj Rag. Reni kiel gvidantojn de I. E. F. (sidejo Verona). Diversaj rezolucioj estis akceptataj por kursoj en publika lernejoj, internaciaj konferencoj ktp.

Aparte interesaj estis la fakaj kunsidoj de la instrua centra organizacio Itala Katredo de Esperanto, de la fervojistoj, P.T.T.-oficistoj kc.

Dokumentaro.

Ministerio por Industrio kaj Komercio.
Generala Direkcio de l' Komercio.
Div. Komercia Instruado.
N. Prof. 14982.

Roma, 20. aŭgusto 1923.

„Itala Esperantista Federacio“ (Verona, via St. Egidio, 6) petis, esti rajtigata starigi liberajn kursojn de Esperanto ĉe la Reĝaj Komerciaj Institutoj. Tiu ĉi ministerio sidante neniel kontraŭas kaj lasas liberon al tiu Administra Konsilantaro decidi laŭ propra pripenso, senpere akordigante en jesa eventualeco kun I. E. F. por la starigo de diritaj kursoj, kiuj tamen ne devas iam ŝarĝi sur la Institutatan budĝeton kaj ĝeni la regulan lecionprocedon.

Al tiuj
R. Komerciaj Lernejoj
por konigo al I. E. F.

Laŭ ordono de la Ministro.
subskr.: Marmiroli.

Interfoira komisiono.

Oni informas nin pri denova aktiveco de la laboroj de tiu-ĉi komisiono laŭ programo speciale starigita. Propagandistoj havantaj rilatojn al Esperantiemaj fiotoj, ekspozicioj kaj samspecaj entreprenoj sin turnu por informoj, programoj ktp. al Interfoira Komisiono, D-ro J. Dietterle, Leipzig-Schl. Seumstrasse 10.

poluriloj de feraj radoj, kiujn li estis elpensinta. Li plenumis tiel bone sian pruvon, ke lia eltrovo havis tian sukceson, kian ĝi havas nuntempe ankoraŭ.

La lasta duko Karlo de Burgundo, al kiu oni rakontis pri la eltrovo, invitis lin kaj donis al li tri grandajn ŝtonojn por poluri kiel provon kaj kiel eble plej ŝpareme.

Ludeviko komencis la laboron kaj sukcesis tre bone, kaj la duko estis tiel ravita de tiu grandioza eltrovo ke li donis al li 3000 dukatojn kiel rekompencan.

Estas preskaŭ ne kredible, ke 14 jarcentoj devis pasi antaŭ ol oni trovis ĉi tiun simplan eltrovon. Tamen tio estas la vero, simila al la deveno de multaj aliaj eltrovoj modernaj.

La naturo estas granda libro kiu estas malferma por ĉiuj kaj kiu senvalias siajn sekretojn al tiu homo, kiu volas legi en ĝi.

Tamen estas fakto, ke multe da grandaj eltrovoj keŝtiĝas per hazardo.

En la sama jaro de lia eltrovo alvenis van Berken en Antverpeno por hejmiĝi sin tie, ĉar tiu ĉi urbo estis fame konata pro siaj rubenpoluristoj.

Per konsilio kaj helpo de siaj helpemaj amikoj, li poluris interalie la konatan diamanton „Jancy“, kiu en la mezo de 14 a jarcento ekspediĝis el Hindujo al Eŭropo, kaj kiu apartenas al Karlo la Kuragega, duko de Burgundo.

Van Berken kaj liaj sammetianoj instruis bonajn lernantojn, kaj la diamanta prilaboro iĝis en tiu ĉi urbo propra industrio.

Ŝtatpolitikaĵ cirkonstancoj fermigis multfoje la Antverpenajn diamantfabrikejojn, kaj sub la hispana interregno transloĝiĝis la industrio al

Pri la lernado de Esperanto en la maristaj lernejoj.

De ĉiuj flankoj oni legas pri la enkonduko de nia lingvo en komercaj lernejoj; en ĵiuj lernejoj eĉ komencis, en aliaj baldaŭ komencos ĝia instruado almenaŭ kiel laŭvola studo.

Tio estas certe grava sukceso, ĉar la malfacileco estas ĉiam en la komenco.

Oni faras grandan propagadon por enkonduki en la praktikan komercan tiun lingvon; la Esperantistaj societoj ricevas de ĉiuj foiroj oficejon por Esperanto-fako kaj presigas varbilojn Esperante; oni eĉ fondis Esperantan varborson. Ĉiuj tre bonaj periloj por la disvastigo de nia lingvo.

Sed de neniu flanko oni parolis ĝis nun, aŭ mi ne legis, pri enkonduko de ĝia instruado en la maristaj lernejoj.

Sipo veturas senlace de unu al alia haveno, de unu al alia ŝtato, de unu al alia ferparto. Kaj kiu vizitas pli ofte fremdlingvajn popolojn ol la maristoj?

Sed se ankaŭ por la subulaj maristoj la kono de internacia lingvo ne estas tute necesa, ĉar iliĵ interrilatoj kun la havena loĝantaro estas limigataj al personaĵ plezuroj aŭ necesoj, tute alia afero estas por la ŝipestroj kaj ŝipoficistoj, kiuj troviĝas en daŭra kontakto kun la havenaj aŭtoritatoj kaj devas trakti aferojn kun la komercistoj.

Krom tio, kiu inter la komercistoj ne scias kiom da malhelpoj kaŭzas la marŝipkontraktoj kaj la ŝarĝdokumentoj skribitaj aŭ angle, aŭ germane, aŭ france, aŭ itale laŭ la ŝtato, al kiu apartenas la ŝipo, la varŝarĝanto aŭ la aĉetanto?

Se ĉiuj marŝipkontraktoj kaj ŝarĝdokumentoj estus skribitaj nur Esperante, kiun facilecon oni havigos al la komercistoj!

Sed nia grava ŝanĝo certe ne povas esti efektiva, ĝis kiam la plejparto el la supera maristarino ne estos lerninta Esperanton.

Pro tio niaj ĉiulandaj havenaj samideanoj, sed precipe la anglaj, devus penadi, por ke en la maristaj lernejoj estu enkonduko la studado de Esperanto.

Franco Cossutta, del. UEA, Braita.

Amsterdamo. Sed la tradicio konservis la famon de Antverpenaj diamantpoluristoj, ĉar en 1787 kaj 1788, kiam la reĝo de Francujo volis polurigi siajn diamantojn, li sendis ilin al Antverpeno.

La laboro estis konfidata al komercanto Cujplitz, kiu metis la ŝtonojn sub la kontrolon de la fratoj Dargo. La registaro de Sud-Nederlando donis je ilia dispono forlasitan monaĥejon, por aranĝi en ĝi laborejon kaj loĝejon de laboristoj. Al la soldatoj de garnizono en la citadelo estis ordonita la gardado de la trezoro. La laboro plenumiĝis tiel kontentige, ke s-o Chantreine, kiu estis ŝarĝita kun la gardado kaj kun la revizio de la diamantoj, donis riĉajn donacojn al ĉiuj, kiuj laboris pri la ŝtonoj (vidu Gazette d'Anvers, 26. februaro 1728). Dum la franca revolucio kaj sub la unua imperio preskaŭ nenio estis polurita.

Kiam sub la reĝado de Vilhelmo de Nassau la industrio iomete reviviĝis, oni povis nur trovi du dek poluristojn, ĉiuj jam maljunaj homoj, tamen fortaĵ de kuraĝo komenci denove sukcesigi la industrion en la urbo, en kiu ĝi trovis sian devenon, inter ili estis Argo, van Schil, Verheurbrogen kaj van Landen.

En 1880 estis en Antverpeno 15 diamant-laborejoj, kie laboris 800 laboristoj kaj sammulte da lernantoj.

En Amsterdam, kiu post la elmigro de Antverpenaj diamantlaboristoj, sub la hispana interregno estis la monda centro de l' diamant-polurado, estis je la sama epoko 16 grandaj laborejoj, inter kiuj estis unu kun 450 poluretoj kaj okupis pli ol 1000 laboristojn.

Estas nepridisputeble, ke militaj surprizoj kaj enlandaj malpacoj ankaŭ tie la nombron de

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sceligojn (sur poŝtarto al aparta folio aŭ unuflanka skribaĵo, sed ne inter administratistoj privataj sceligoj) pri ĉiu novaĵo, el Esperanto, Esperanto, kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legibile (precise nomoj).

Landoj.

Bulgarujo.

Tirnovoj. La adreso de la Tirnova Esperantista Grupo „Lumo“ estas: Georgi Dončev, str. Gurko 589, Tirnovo. Malfermiĉa kurso por geinstruitoj kun 20 partoprenantoj. La kurso daŭras de 1. aŭgusto ĝis 15. septembro. La agado de niaj samideanoj estas ĝretulinda — eĉ dum la somero ili agadas fervore kaj senlace. Kazanlik. Nia fervora samideano Ivan Sarafov, kiu pasigas sian libere-tempon en sia naskiĝurbo, malfermis kurson kun 15 kursanoj. Je la 27. aŭgusto okazis Esperantista amuzvespero je kiu ĉeestis ankaŭ samideanoj el Siatra Zagora. Sipka kaj Maglis.

Slivnica. Nova grupo fondita. Prez. Al. Antonov. Teŝis. Grupo kun 20 membroj fondita. Estraro: prez. Vasil Cankov, vicprez. Trifon Ivanov, sek. Petr Peikov, vicsek. Geno Gvetanov, kas. Vasil Stoicov. Adreso de la grupo: Petr Peikov, Teŝis. Pazarĝik. La loka grupo „Verda Stelo“ aranĝis la 2. sept. ĝardenan amuzvesperon, dum kiu la milizia muziko ludis „La Esperon“.

La sama grupo eldonis grandajn kaj bonajn afiŝojn kun propaganda teksto por la lerno de Esperanto. Nova Zagora. Ankaŭ tie ekfunkciis jam grupo kun 10 membroj sub la gvidado de Anton Genov, instruisto ĉe la loka reallernejo. (Laŭ „Bulg. Esp.“)

Ĉeĥoslovakio.

Reichenberg. La Esp. instruado en la Komerca Akademio farita deponi du jaroj de nun estas konsiderata kiel ĉiu alia fako.

Per dekreto de la Ministerio por Instruado kaj Popol-klerigo K. 76448/25-III de la 21. aŭgusto 1923 Esperanto estas enkondukita kiel nedeviga instruofako en la ŝtatan median lernejojn de Reichenberg.

La 19. sept. s-o Taubmann-Heida faris propagandoparoladon en salono de la urbdomo. Nova kurso komenciĝas.

Germanujo.

Kiel. Dank' al subteno de s-ano Dittmer okazas kurso kun 68 p.

Kreuznach. S-o Karl Zorn (loka grupo Kreuznach) komencis la 25. 9. kurson kun 12 p. en proksima Bad Münster a. S. en hotelo Kaiserhof.

Magdeburgo. 25. 9. Esp. ekspozicio aranĝita de Lab. Esp. Grupo. Parolado de k-do Voigt el Leipzig pri „Esp. kaj laboristaro“ rezultato kurso kun 25 p., gvidanto k-do Exner. — 26. 9. finigis kurson kun 10 p.

Nederlando.

Gravenhage. Komenciĝis la 24. 9. Esp. kurso por anoj de la Nederlanda Turistunuiĝo sub gvidado de s-o J. Ravesteijn.

Amsterdam. La konata biskvivfabriko „de Lindeboom“ en Amsterdam ekfabrikas bongustajn „Esperanto-valfojn“, kiuj estas haveblaj en ĉiuj gravaj sukeraĵbutikoj en Nederlando.

Rotterdam. La 20. 9. en la supra salono de la laktejo Betersloot 90 en Rotterdam, la Laborista Klubo Esperantista „La Espero“ okazigis sian jarkunvenon. Kvankam la tempo-cirkaŭstancoj ne estas favoraj, oni tamen laŭ la raportoj de la kasisto povas esti kontentaj.

La Prezidanto dankis la kasiston por lia fervoro montrita dum la pasinta jaro. La Estraro estis plenevoce reelektita nome: prez. W. de Jong, sek. F. Pakker, kas. A. H. Riswick, bibliotekario G. Kas, komisiario J. van Boven kaj J. Bout. Kiel gvidanto de la nova kurso komenciĝinta la 4. okt. denove funkcias s-o de Jong.

Gazetaro.

Le Soir, Bruxelles, 8. 9. Kontraŭ Esp. informo pri la decido de la intelekta komisiono en L. d. N.

Agrupacion Escultista, Barcelona, sept. New Jersey Post, Town of Union N. J., 1. 9. Kun notoj pri Esp.

Eugenia, Barcelona, sept. Norsk Bokbinder Tidende, Kristiania, sept. Kun Esp. informoj.

France Europe Orient, Paris, 7. 9. Kun Esp. aldonoj.

Ugens Dzesjeg, Riga. L'Index, Paris, sept. Kun Esp. notoj kaj indikoj.

Hotel-u. Gastgewerbezeitung, Reichenberg, 20. 9. Pri Venezia Gazet van Mechten, Mechten, 21. 9. Pri skolfismo kaj Esp.

Pri Esp. kurso.

Freiheit, Düsseldorf. Pri SAT-kongreso.

Volkszeitung, Düsseldorf.

Päwaleht, Tallinn, 10. 7. Art. de A. Pung pri nuntempa stato de Esp. — 14. 8. Pri XV-a Kongreso.

Tribüne kaj Volkstimme en Magdeburg, 22. 9., enhavis artikolojn pri Esp.

Rigasche Nachrichten, 27. 9. Pri Esp. grupo en Riga.

Republika, Lódz, 24. 9. Pri Venecio laŭ „L. K.“.

Ersekutvár és Vidék, Nové Zamky (Hung.), 9. 9. Pri XV-a en Nürnberg.

De Avondpost, Gravenhage, 22. 9. Anonco pri Esp.

New Jersey Post, Town of Union, 15. 9. Art. „Ligo de Ordo“, de s-ano A. v. Matich en Budapest.

laboristoj malpliligiĝis, ĉar je la fino de XVII-a jarcento estis nur 6 poluristoj en tiu urbo, kaj ili estis jam delonge sen laboro.

La trovo de brazilaj diamantminejoj liveris milojn da karatoj da diamantoj al la Amsterdamaj laborejoj kaj donis tiamaniere al la industrio de ĉi tiu urbo nekonektan prosperon.

Laŭ enciklopedio de diamant-industrio de D-ro F. Leviticus, estis Petro Goos la unua konata diamantpoluristo en Amsterdam. Lia nomo estas enskribita tie je la dato de 1. 29. decembro 1589. Li venis al Nord-Nederlando kunne kun la unuaj Antverpenaj poluristoj, kiuj foriris de Antverpeno.

Nuntempe Antverpeno estas denove la ĉefcentro de la diamantindustrio. En Belgio estas ĉirkaŭ 10000 gelaboristoj kaj en Amsterdam ĉirkaŭ 7000, en Hanau (Germanujo) 800, en Francujo 1000. La nombro de laboristoj en la tuta mondo estas ĉirkaŭ 25000.

Barend Schoen, Merxem (Belgiujo.)

Scienco.

Necesega helpilo en la kriminal-servo.

La tutmonda kongreso de kriminalpolicistoj, antaŭ ne longe okazinta en Wien, okupis sin pri la demando, ĉu ne estus rekomendinde enigi en ĉiun pasporton kaj legitimacion de la oficialaj institucioj fingroŝtampojn de la posedanto. Oni ne decidis rekomendi tion, ĉar tio kaŭzus multajn malfacilaĵojn kaj malhelpojn al la publiko. Sed evidente oni estis samopinia pri tio, ke tia procedo signifus esencan progreson en la batalo kontraŭ la krimoj, se ĉiu estus devigata posedi ŝtampajn reproduktion de sia fingro. Tiam estus sendube eble tre rapide kapti multajn krimulojn, kiuj nun sukcesas kaŝi sin en la internacia trafiko. La policiaj institucioj en la lasta tempo ekkomencis interŝanĝi la reproduktion de la fingroŝtampoj. Se oni povus postuli de ĉiu internacia vojaĝanto pasporton kun fingroŝtampa reproduktion, estus almenaŭ tre faciligitaj la krimuloj kaŝi sin en la internacia vojaĝa trafiko.

La eksterordinare granda graveco de la fingra ŝtampaĵo konsistas en unika aranĝo de la palporganoj de la homaj fingropintoj. La organismo de la palpiloj ne estas sensistema, sed formas longajn palpinojn, kiujn oni povas observi je siaj propraj fingroj en multvariaj, kontraŭ-kaj ĉirkaŭirantaj sulkoj. La palpinoj havas la proprecon, ke ili ĉie de la ekpreno per la mano restas preskaŭ neŝanĝitaj, tiel ke oni per reproduktion de la linioj ĉiam povas rekonii la konkretan personon.

Aligis la fakto, ke tiuj linioj ĉe ĉiu homo formas alian bildon, per kio intermiksoj sekve de simileco estas efektive maleblaj.

La propeco de la fingro-ŝtampaĵoj jam antaŭ jarcentoj estis konata al la linioj. En Eŭropo oni enkondukis ilin nur antaŭ ne longe. En la komenco oni malfidis al la metodo. Kiel konvinkigis la kongreso, hodiaŭ oni estas konvinkita, ke oni per la fingroŝtampaĵo posedas plej bonan armlinon kontraŭ la krimuloj. Konforme al tio oni ankaŭ praktikis kaj sciencie perfektigis ĝin. La scienco ekzemple kalkulis, ke absoluta egaleco de la fingra ŝtampaĵo okazas nur inter amaso de almenaŭ 64 miliardoj da homoj kaj ke kvin miliardoj da jaroj devos pasi, ĝis kiam du absolute egalaj fingro-ŝtampaĵoj estos troveblaj. Tiu ĉi du kalkuloj estas egvaloralaj al la certeco, ke egaleco en la praktiko estas fakte nebla. En la praktiko oni diferencas en la rekono de fingra ŝtampaĵo tielnomatajn punktojn, t. e. certajn propecojn. Entute ekzistas proksimume cent tiaj punktoj. Sed en menui kazo estas necese konstati la identecon de ĉiuj ĉi tiaj punktoj por rekonii la fingroŝtampaĵon, trovitan je la agejo, kiel tiu de certa persono. Sufiĉas ĝenerale 12 punktoj por fari tiu ĉi konstaton. Tio estas pruvo, ke la unuopa fingra ŝtampaĵo estas en plej alia grado individua rekonilo. Tio estas des pli grava, ĉar ofte postrestas je la krim-agejo sole tiaj eroj de la fingra ŝtampaĵo, kiuj tamen farigas rekonigojn pro tio, ke ili enhavas tiun aŭ tiun ĉi karakterizan punkton.

Krimulo kompreneble estas tre singardema por ne posilasi rekonigan signon. Malgraŭ ĉio oni preskaŭ ĉiam trovas post krim-ago malpurajn makulojn, ĉar eĉ la plej malvarmsanga krimulo ne evitigas la postrestadon de tiaj rekon-signoj. Li lili malpurigaĵas siajn fingrojn, kaj tiam oni trovas je la krim-loko la reproduktion de la fingra ŝtampaĵo. Eĉ se li estas plej singardema kaj kredas ne esti postlasinta tian signon, li poste estas instruita per la policio pri alia rezultato. Per kemiaj rimedoj estas eble igi rekonieblaj fingro-ŝtampaĵojn eĉ tiam, kiam la krimulo pleje penis fari sian metiion per puraj kaj sekaj fingroj. La aktoj de la kriminal-polico enhavas eksterordinare interesajn kazojn, en kiuj dank' al tiu ĉi helpilo la mano de la justeco povis rapide ekkapti la krimulon.

Arto.

La prezidinto de L. K. K. en Nürnberg teatra alĵoro.

Prof. D-ro Ledermann, la aŭtoro de 4 aliaj teatraĵoj (inter ili la multludata komedio „Ekskurs-aĉo al Starafuĵo“, tradukita ankaŭ en la francan kaj ĉeĥan lingvojn), verkis novan 3-aktan komedion el galanta epoko „La kabalo de Rennsdorf“, kiun akiris la bonfama teatra agentejo Drei-Masken, Berlin. La unua reprezentado okazos komence de novembro en la „Cambroludoj“ en Nürnberg.

Geografio.

Rodezio.

La 12. septembro Suda Rodezio, la lando inter la riveroj Zambesi kaj Limpopo, inter Mosambiko, Transvalo kaj la protektorato Beĉuanolando estas envicigita en la aron de britaj „dominions“. La 1. oktobro la respondeca registaro prenis sin la administradon de la lando, kiun ĝis nun estris la Brita Sudafriko-Kompanio. Pro tiu ĉi ŝtata akto inter la Sudafrika Unio — rekomendanta la aligon al la

Unio — kaj la rodeziaj koloniistoj okazis longedaŭraj luktaj. La plimulto de la koloniistoj per referendumo decidis en oktobro de la lasta jaro pri aŭtonoma administrado. La transdono al la aŭtonoma registaro estas rimarkinda okazantaĵo. Por aprilo venontjara oni projektas la transdono de la administraco de Norda Rodezio el la manoj de Sudafriko-Kompanio al la Koloni-Oficejo, per kio Nord-Rodezio fariĝos kron-kolonio. Tiam ekzistos ankoraŭ sole unu kolonia lando, administrata per kompanio, posedanta reĝan privilegian leteron, Norda Borneo.

Rodezio ricevis sian nomon laŭ la fama konata pioniro pro Sudafriko Cecil Rhodes. Depost la lasta ribelo en 1896 la kolonio bone evoluigis. La or-eksploatoj tamen ne atingis la esperintan rezulton. Aliflanke la lando estas riĉa je aliaj ter-trezoraĵoj, ĉefe karbono.

Rodezio estas 1158000 kvkm granda kaj nombras 1600000 enloĝantojn inter kiuj troviĝas sole proksimume 35000 blankuloj.

Internacia trafiko.

Poŝto tra la dezerto.

Informoj el Malgrand-Azio sciigas, ke post ne longe poŝto tra la dezerto ekfunkcios. Agiĝas pri komuniĝo inter Bagdad kaj Damaskus transverse tra la dezerto per helpo de aŭtomobiloj. Dum la lastaj tagoj de la monato aŭgusto oni faris provan veturon laŭ tiu vojo. La komuniĝo feli funkciis, ke leteroj senditaj fluokaze dek tagojn poste jam estis en London. Tio rapidece ne multe diferencas de tiu de la aerpoŝto. De Damaskus ekzistas fervoja komuniĝo al Haifa por atingi la ŝip-liniojn. Vojaĝantoj uzintaj la tradezertan vojon traveturis la tutan distancon per fervojo, vaporsĥipo kaj aŭtomobilpoŝto en entute 9 tagoj. Tio tute egalas al la veturdaŭro per aeroplano. La regula veturado tra la dezerto de Bagdad ĝis Damasko estas eksterordinare granda progreso. Ĝis nun funkciis okaze kablo-poŝtoj bezonintaj almenaŭ 14 tagojn. Post kiam la provaj veturoj bone sukcesis la regula trafiko post ne longe estos daŭra instalaĵo.

Aerveturado.

Oni telegrafis el Washington (Usono), ke la Marista Departamento preparas la transveturon de la Zeppelin-aerŝipo Z. R. 3 de Friedrichshafen (Germanujo) al Lakehurst. La transveturo okazu komence de novembro. Zeppelin Z. R. 3 estas konstruita en Germanujo laŭ mendo de la nomita departemento. Oni intencas efektiviĝi la veturon tra Francujo, la Acoraj insuloj kaj Bermudo. La tuta distanco estas 4500 mejloj. Sur la vojo troviĝos miliŝipoj por eventualaj akcidentoj.

Linio Toulouse—Oran.

Ĝus estas inaŭgurita la nova aerflakia linio Toulouse—Alicante—Oran, per kiu estas realigita la unua aera interligo inter Alĝerio kaj la franca ĉefurbo.

Poŝto kaj Telegrafo en Rusujo.

Poŝto kaj Telegrafo ĝis milito en Rusujo estis tre malforte disvolvitaj. En komenco de milito 1914—18 unu loganton trafis nur ĉirkaŭ 15 poŝtsenditaj jare; unu poŝto-telegrafa oficejo servis al 14000 loĝantoj aŭ 1400 kvadr. km.

Troŝargiteco de poŝto-telegrafa aparato dum milito kun Germanujo-Aŭstrio kaj poste interna milito, detruado de poŝtaj kontroloj, telegrafaj linioj k. a. dum militaj okazintaĵoj, kaj ĝenerala malfacila situacio dum militaj okazintaĵoj, kiuj generis malfacilan situacion nature nur pli malbonis staton de interrilatioj en Rusujo.

Dum 1921 estis denove malmaltaj 2914 poŝto-telegrafaj punktoj kaj en komenco de 1922 funkciis en tuta respubliko 12714 poŝto-telegrafaj stacioj (1910: 14600 en Rusujo laŭ antaŭmilitaj linioj). De 1920 ĝis novembro 1921 telegrafa linio pliflongiĝis je 770 km kaj atingis 550000 km (700000 km en antaŭmilita Rusujo).

1921 estis nove instalitaj 64 akceptaj radiostacioj, kio plimultiĝis tian nombron en respubliko ĝis 284. Estis aplikata vico da gravaj pliferktigoj kaj novaĵoj en radio-tekniko (Radio-telegrafaj transdoniloj kaj relatio de Prof. Bonč-Bruĉiĉ, rektigilo de ŝanĝiganta elektra fluo de Ingen. Sorin k. a.).

Poŝto-telegrafa interrilato en unua duono de 1921 rimarkinde kreskis. Simplaj leteroj kaj presaĵoj estis forsendataj en unua duono de 1920: 976000000. 1921: 1497000000, rekomenditaj leteroj 57 kaj 65 milionoj ktp. (En unua duonojaro 1916 en tuta Rusujo estis forsenditaj 2572000000 simplaj leteroj kaj 44000000 rekomenditaj.) Entute estas registritaj poŝtsenditaj 1919: 1427000000 1920: 2421000000 kaj en unua duono de 1921: 1798000000.

En Soviet-Ruslando loĝas nun 130000000 homoj. Rezultas: 1921 trafis unu loĝanton 27 poŝtaj senditaĵoj, t. e. preskaŭ duoble pli multe ol en komenco de 1. m. m. m. m. m. m. m.

1921 estis starigataj regulaj rilatoj inter Soviet-Ruslando kaj granda parto de la landoj de la Tutmonda Poŝta Unio.

H. Frank, Kazan.

Senfadna Telegrafado.

Eiffel-tura koncerto en Koblenz (Germ.). La 26. 9. oni havis en Koblenz unuafaja la okazon, aŭskulti sur la strato radiotelegrafitan koncerton. El granda funelo laŭtigis en Kronprinzen-strato por la pasanta publiko la koncerto de la Paris-a Eiffel-turo. Oni aŭdis francan kaj anglan antaŭparolojn, kanton de kantistino kaj instrumentan koncerton. Konsiderante la distancon, la koncerto estis kontente klara. Oni — precipe la Koblenz'aj gesamideanoj — preferus aŭdi la antaŭparolon en la Esperanta lingvo. Laŭ ĵurnala sciigo la sensacia novaĵo estos de nun ĉiutage inter 18.15 kaj 18.45 h.

L. F.

Internacia sporto.

Bulgarujo.

Sporta societo „Slava“ de Timovo ludis en tiu ĉi urbo kontraŭ sporta societo „Vihar“ de Ruskuj kun rezulto 3:0 por „Slava“.

Germana Scienca Esp. Asocio.

Raporto (erare malfaritaj) pri la ĉekunveno en Nurnbergo, 9. aŭg. 1923.

La plej gravaj decidoj estas: 1. Malgraŭ la grava krizo en Germanujo la asocio daŭrigata por prezenti helpon kaj aligon al la scienco laborantoj, kiuj pli kaj pli bezonas Esperanton.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale esprimataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberalaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale ritizi nekajajn artikolojn.

210. Pri korespondado.

Oni plendas ofte pri la manko de respondo al korespondoj ricevitaj laŭ la anoncoj en la Esperantaj gazetoj. Kiel mi spertis antaŭ 16 jaroj, la korespondon per kelke da vortoj sur ilustr. poŝtkartoj servas al la lernantoj kiel puŝo al diligenta ellernado kaj samtempe kiel bona ilo por verbi novajn anojn el mia ideo.

211. Rilatas al 185.

S-o Kronenberg en n-ro 145 de ET donas „klarigojn“ pri kelkaj vortoj Esperantaj devenantaj laŭ li, el pola lingvo. Ĉiuj liaj ekzemploj, krom la sufikso „ul“, estas aplikablaj, foje eĉ pli bone, ankaŭ al rusa lingvo.

212. Rilatas al 186.

Ankaŭ mi aldonu, kio el la jida lingvo troviĝas en Esperanto. La sufikso -ac estas prenita el la jida lingvo. Ekz.: ling (junulo), jingac (junulaĉo).

213. Rilatas al 201.

Preskaŭ ĉiuj Esperantaj gazetoj, revuoj, libroj kaj entute ĉiuj Esperantaj verkaŭtoj — eĉ tiuj, kiuj pretendas je seriozeco kaj lingva pureco — svarmas je tre gravaj gramatikaj eroroj kaj malregulaĵoj. Inter aliaj estas montritaj ĉi-tioj nur tri aŭ kvar, kiuj plej ofte renkontiĝas.

1. Anstataŭ „ankoraŭ ne“ oni uzas „ne jam“. Ekzemple, ankoraŭ „kio ankoraŭ ne venis, venu tu“ oni diras „kio ne jam venis, venu tu“. „Ankoraŭ“ kaj „jam“ havas ja tute malsaman sencan. En la „lingvaj respondoj“ D-ro Zamenhof ja klarigas, ke la esprimo „jam“ en ĉi tiu senco estas ĉi tiu, kiun oni uzas, kiam oni alintencas, ke oni intencas ĉi tiu viziti, sed poste mi ŝanĝis mian intencion, tiam mi devas diri: „mi jam ne vizitos vin“; dum la vorto „ankoraŭ“ simple konstataks fakton, kiu ĝis nun ankoraŭ ne estas plenumita.

Malfruiĝo de ET

ne estas nia kulpo. Ĝi rezultas el la specialaj ĉirkonstancoj en Reinlando malfaciligantaj la komunikojn. ET estas regule ekzistanta ĉiutage.

Ekzemple... „Lian kazon fin-procesis senkapiga sabrotato“: evidente devus esti „lian okzon“. „Kazo“ estas ja deklinacia finiĝo (ne ekskluzive. Red.) de nomoj kaj adjektivoj, dum „okazo“ estas iu okazintaĵo.

Por Aktualigo de ET

ni deziras taŭgan materialon. Asocioj, ligoj, federacioj, grupoj ktp. nepre sendu tiuj raportoĵojn pri siaj aranĝoj, kongresoj kaj aliaj okazantaĵoj en nia movado.

214. Jam ne — ne ankoraŭ, ne jam — ankoraŭ ne.

Rilatas al 201. La signifon de tiuj formoj ni klarigu al ni konsiderante jenon: 1. Se iu devas komenci labori je la oka kaj, venante antaŭ la oka, mi trovas lin jam laboranta, mi povas diri: „Li jam laboras.“

Resumo. Ekzistas kvar formoj eblaj: 1. li ne jam laboras = 2. li ankoraŭ ne laboras = 3. li jam ne laboras = 4. li ne ankoraŭ laboras = 5. „kaj“ = 6. „ne“ estas necesaj, tamen „3“ tre aprobinda pro ĝia mallongeco.

215. Eksterdomismo kaj eksterdogmismo. La praktikan kaj moralan nevaloron de la eksterdomismo kaj eksterdogmismo edukadumede de la skolta movado publikigita de W. Leslie en ET n-ro 154 sub titolo „Esperanto kaj Eksterdomismo“ montras tre sperta amerikano fakulo.

La ĉefkomisaro de la publika bonfara sekcio en New-York, s-ro Coler (nekatolikoj), diris okaze de kunveno jene ĉi atentindajn vortojn: „Miaj rifuĝaj spertoj kiel ĉefo de la ĉi-tiea bonfara sekcio konvinkis min, ke la elekzio devas fari la unuajn laborojn, kiam oni intencas sukcesan bonfaran protekton.“

P-ro Kamillo, D. F. M., Linz (Aŭstrio).

Bibliografio.

Recenzoj.

Kongresa Libro de la XV-a Universal Kongreso en Nurnbergo 1923. Eldoniĝa de la LKK Apartenas al la kongresa dokumentaro. Prezo laŭ la posikongresa cirkulero en ET n-ro 158.

La Esperantisto en Germanio de Hans Koch.

Qvidlibro „La Esperantisto en Germanio“ de Hans Koch. Gvidlibro „La Esperantisto en Germanio“ de Hans Koch. Gvidlibro „La Esperantisto en Germanio“ de Hans Koch.

Preter la vivo. Poemaro de Julio Baghy.

Preter la vivo. Poemaro de Julio Baghy. 124 pg. Kun portreto de la aŭtoro. Eldoniĝa de „Literatura Mondo“ en Budapeŝto.

La Reĝo Judea. Dramo en kvar aktoj kaj kvin bildoj de K. R. El rusa lingvo tradukis V. Devjatin.

La Reĝo Judea. Dramo en kvar aktoj kaj kvin bildoj de K. R. El rusa lingvo tradukis V. Devjatin.

kiel temon prilaborindan. Memed ĝin nomas „verko klasika kaj ankau pure scienca“; li ne iroigas la veron. Ne ĉiuj versoj kaj ne ĉiuj lingvaj formoj al mi placas, ek kelkajn erojn kaj preserojn mi notis; sed tiuj negravaĵoj ne malaltigas la efektivan valoron. Mi nur volus eksci, pro kio s-o Memed kaŝas la nomon de l'verkito? Iun kaŭzon mi absolute ne vidas, kaj la internacia legataro rajtas koni la nomon de l'poeto.

G. Ajuŝ

Ilustrita Gvidlibro tra San Francisco. (Kalifornio) Usono. Havelba kontraŭ l' resp. luptono de Esperanto Association of California (Ive) 509-10-11 Chronicle Building, San Francisco, Calif.

Prezantas sin al ni malgranda, 48 paĝojn dika, tre bela gvidlibro, eldonita okaze de la Xia Universala Kongreso de Esperanto en San Francisco. Legindaĵo detaloj kaj belaj bildoj igas la libron utila al ĉiu, kiu interesiĝas pri tiu ĉi fame konata urbo de Kalifornio. Tipografie kaj lingve ĝi estas same bona. Mi nur trovis kelkajn preserojn kaj nekomprenblajn neologismojn, bezantaj kredibile sur la scio de aliaj fremdlingvoj. Entute mi rekomendas la mendon al ĉiu interesiata Esperantisto.

R. Kr.

Gazetoj.

Holanda Esperantisto, Zutphen, n-oj 87, 88, 89, 90. Bulgara Esperantisto, Sofia, aŭgusto. Kun raporto pri la bulg. kongreso. Argus, Mexico D.F., jul.-aŭg. Kun raporto pri Venezia. La Interligilo de l' PTT., Paris, sept. Interesa enhavo, por fakanoj.

Der Arbeiter Esperantist, Leipzig-N., sept. Norvega Esperantisto, Kristiania, jun.-jul. Reaperis post 8-jara interrompo. (Esperable ĝi helpas multe al la dezirinda pilgrandigo de la Esperantistaro norvega!) Esperanto, Geneve, aŭg.-sept. 27-paĝa kun delata protokolo pri la XV-a. Aldonoj: Bulneto kaj Informilo. Literatura Mondo, Budapest, aŭg. En konata artistia arango kun modela enhavo.

Hungara Esperantisto, Szeged, aŭg.-sept. Svenska Arbeiter Esperantisten, Göteborg, sept. Marto, Haida, sept. Esperanto Praktiko, Berlin, aŭg.-sept. Anoncas sian provizoran malaperon.

Itala Esperanto Revuo, S. Vito al Taorminento, jul.-aŭg. Pri la urbo de l' 8-a itala kongreso Esp. Lumturo, Bremen, duobla kajero, 1.-15. sept. Informoj de Esperanto Asocio de Estonio, Reval, sept. The British Esperantist, London, sept.

Internacia Stenografisto, Issy (Seine), sept. Celas propagandon de Esperanto inter stenografistoj kaj reverse. La numero jam enhavas pri stenografo nur 2 kolumnojn. Amerika Esperantisto, Boston 17, Mass., jul.-aŭg. Kun delata raporto pri la 16. Amerika Esp. Kongreso.

Internacia Asocio de la Esperantistaj Stenografiistoj.

Dimanĉon, la 9-an de septembro, stariganta kunveno okazis en Centre Office, en Paris por realigi, la starigon de Internacia Asocio de Esperantistaj Stenografistoj, starigo por l' provizora komitato laboris jam de kelkaj monatoj. La celo de tiu Asocio estas:

1e Grupigi la izolitajn personojn kaj societojn, adeptojn de Esperanto kaj de tiu ajn stenografika sistemo, por pligrandigi kaj plifortigi ilian agadpovon kaj plifacile realigi iliajn komunajn aspirojn;

2e Propagendi Esperanton en la stenografistaro kaj stenografion en la Esperantistaro;

3e Informi siajn membrojn pri la diversaj sistemoj — naciaj kaj Esperantaj — uzataj en ĉiu lando, kaj ankau pri la stato kaj disvastiĝo de Esperanto kaj stenografio en ĉiu loko;

4e Verki teknikan steno-skrilbmaŝinan vortaron;

5e Helpi la kreadon de teritoriaj aŭ sistemaj societoj de Esperantistaj stenografistoj;

6e Studi — eksterne de ĉiu atento pri tiu ajn stenografika sistemo — la demandojn sciencajn, profesiajn, ekonomiajn aŭ socialajn, kiuj interesas la stenografistaron;

7e Disvastigi la bonan instruadon de Esperanta stenografiarto per instruado de profesoroj kaj ekzamenoj de la glermitoj;

8e Disvastigi la profesion de Esperanto-stenografistoj kaj konstante plibonigi la situacion de tiuj profesiistoj. La kotizaĵo kostas 5 francajn frankojn ĉiujare.

La Asocio eldonas ĉiudomonatan autofranclian gazeton „Internacia Stenografisto“ kiu estas sendata senpage al ĉiuj asocianoj.

Ĉiu stenografistoj petu la Regularon de tiu Asocio de la provizora sekretario: s-o P. Flageul, 9 Boulevard Voltaire, en Issy (Seine), Francujo.

Oficistaj Grupoj.

En la mezo de la Sindikato de la Industriad kaj Komercaj Oficistoj de Anverpeno, laboras de kelkaj jaroj, vigla grupo Esperantista nomita la „Verda Standardo“. Ĝi organizas ĉiujare vesperan kurson de Esperanto sub la oficiala kontrolo de la Sindikata Estraro.

Unu el la celoj de la „Verda Standardo“ estas la kolektado de profesial informoj el ĉiuj landoj kaj la reciproka servo al fremdaj oficistoj, kiuj interesiĝas pri Belgujo. Ĝi klopodas interrilati kun geolocioistoj kiuj konsentas doni sciigojn pri la sindikata movado en sia lando kaj interŝange la „Verda Standardo“ komunikas ĉiujn deziratajn informojn.

La interesaj raportoj kiujn ricevas la „Verda Standardo“ de siaj eksterlandaj korespondantoj multe helpas la propagandon de Esperanto en la oficistaj medioj.

Al oficistoj aŭ grupoj dezirantaj interrilati ĝi petas doni unue ĝeneralan ideon de la oficista vivo en la lando laŭ jena demando:

1. Ĉu ekzistas en via lando sindikata organizado de oficistoj?

2. Ĉu ekzistas unu Federacio por la tuta lando aŭ pliaj? Titolo, adreso?

3. Laŭ kiuj vidpunktoj apartiĝas la grupoj? Politika-religia-klasa?

4. Ĉu ekzistas legaro protektanta la oficistaron? De post kiu jaro?

5. Kiujn punktojn pritraktas la legaro? a) salajro? b) laborhorj? c) sanecaj kondiĉoj? d) minimuma tempo por maldungo? e) asekuro pri labornekapabileco pro malsano? ŝtala aŭ privata asekura kaso? f) pensio de la ŝtato aŭ privata pensikasoj?

6. Kiuj estas la nunaj ĉefaj deziroj de la oficistoj en via lando?

La grupo tre volonte respondoas al similaj demandoj kaj ankau al ĉiuj aliaj informoj pri komercaj, industriaj kaj ekonomiaj demandoj, kiuj povos helpi la propagandon por Esperanto.

La Verda Standardo Esp. G. de la Bedienden Syndicaat van Handel en Nyverheid, Korte Nieuwstraat 44, Antwerpen.

Eugen Wüster. Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana.

La unua parto ĵus aperis (Literoj A-C) Prezo: 14.— gmk (x ŝlosilnombro) = sviz. fk. 17.50; hol. guld. 8.—; ŝil. 14.—; kc. 105.— ktp.

ANTAŬMENDOJ

de la dua kaj tria partoj nur povas esti akceptataj, se ili estas akompanataj de 5 ŝ aŭ samvaloro en alia nacia monunuo.

La altegaj preskostoj kaŭzitaĵe de la malbonega ekonomia stato de Germanlando devigas nin je nuligo de niaj antaŭe sciigitaj liverkondiĉoj rilate la pagon de 1 aŭ 2 ŝ.

La presado nur povas esti daŭrigata, se alvenos almenaŭ 500 antaŭmendoj ĝis la 31. oktobro.

Mendu senprokraste, se vi deziras la daŭrigon de tiu plej grava el ĉiuj vortaroj!

Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Por serioza propagando

havigu al vi la ĵus aperintajn artiste aranĝitan dulingvan broŝuron Germanan-Esperantan

Pri la solvo de l' problemo de internacia helplingvo por komercio kaj trafiko

Oficiala raporto pri Venezia kun laŭcela antaŭparolo de Robert Kreuz

Skribu ankoraŭ hodiaŭ al

Messamt (Esperanto-fako), Frankfurt am Main, Germanujo.

Kontraŭ deseno de respektiva nombro de ET-numeroj el la abonkono

ni liveras al abonantoj

la libron

„Litova Almanako“.

285 paĝoj, modela, instrua, interesa. Prezo 5.50 sv. frk.

Mendu tuj! ĉe la Administracio de ET.

Komercaj komisioj

de ĉiu speco estas akceptataj de

Agentejo Finke & Eckert,

Roonstrasse 17,

Wilhelmshaven (Germanujo).



Se vi serĉas liverojn por ĉiuspecaj komercaj kaj industriaĵoj aŭ se vi deziras akcepti la reprezentadon de eksportkapablaj firmoj, turnu vin en via propra intereso al la

KOMERCISTA ESPERANTO GRUPO FREIBURG I. BR. (GERM.) KATHARINENSTR. 14

kui havas bonajn rilatojn al germanaj industriaj kaj komercaj rondoj. — Perado senkosta. — Al demando aldonu resp. — kup.

ĈU VI DEZIRAS LEGI ?

la en ET jam aperintajn literaturaĵojn

Mendu tuj „Bukedo“

1-a volumo. Prezo po 1.— sv. fk.

Por abonantoj 3 ET-numeroj.

Eldonejo Esperanto Triumfonta, Horrem b. Köln.

En oktobro finiĝas por multaj la abono

Abonantoj de Literatura Mondo!!!

Se vi renovigas vian abonon ĝis 20. oktobro, vi ricevas donace belan libron! Jar-abono sv. fk. 10.— aŭ egalvaloro. Po numero sv. fk. 0.80.

Po-jare dekdu ampleksaj numeroj!!!

Eldonejo: Budapest, VI, Andrassy-ut 81.

AL NIAJ LITERATURAMANTOJ ni rekomendas:

	Prezo:
Wiseman, Fabiola	5 sviz. fk. aŭ egalvaloro
Ranco, En Svislando	2.50 „ „ „ „
Thurston, La urbo de belega sensenĉajo	2 „ „ „ „
Hebbel, Gyges kaj lia ringo	2 „ „ „ „

Lippmann k. a., La Vendreda Klubo

Ni liveras nur post antaŭa pago. Por afranko aldonu 10%.

Butin & Jung G. m. b. H.

Esperanto-Eldonejo

Godesberg (Germanlando) : Bahnhofstrasse 30. Postĉeka konto Köln 92036.

Anoncetoj.

NIA SAMIDEANO WLADISL. MICSEĈ en Budapeŝt estas treege malŝerciga (blindigita kaj paralizita je ambaŭ kruroj) kaj nuntempe li estas ŝtate devigita dividi siajn enspezojn inter kvar (aliaj eksmilistoj), pro kio neniu el ili povas vivi. Mi petegas vin, samideanoj precipe bonvolulaj, helpi kiel kaj kiom eble plej povos. Jen okazo vera montrti Zamenholan spiriton. Donacojn perados Georg Menzel, Apotekestro, Breslau, Hohenzollerstr. 20. (Rekomendita de la redakcio).

Mi SERĈAS estintan rusan oficiron Vaslii Aleksandroviĉ Merinov de 15-a Turkestana regimento el urbo Merv, meza Azio. Li havas 19-jaran filon, Papp Kalman, Pispökladány (Hung.)

Mi SERĈAS MIAN FRATINON, servinta kiel kuristino en Rusujo. Sia antaŭmalita adreso estis: Ljezelo Kijak, Celekier Ozokievitovo Neftianje Promysla Tovaristvo Subotard. Depost 1914 mankas informoj. Skribu kontraŭ rekomenco al W. Kijak, Radom (Poljo).

FILATELISTOJ! Mi vendas 15000 malnovajn rumaniajn poŝtmarkojn kontraŭ 500 sv. frk. aŭ egalvaloro. Adresu al s-o Spas Dobrev, Kenalar (Bulgariujo).

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIERAJ TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO. La Vostokov aŭ faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo.

Korespond kaj interŝango.

Filatelisto! Por 2 sviz. fk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝangas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz i. Vgtl., Bergstr., 5. [16]

Ruslandaj samideanoj atentu! Mi deziras korespondi kun samideanoj prefere el la regiono de Minsk aŭ Kiew pri ĉiu temo. Bonvolu skribi al Alfons Goppel, Altes Gymnasium, Regensburg, Bayern, Germ.

F-ino Mady King, Callenstr. 8, Berchem (Antwerpen), Belgio, studentino 20-jara, deziras interŝangi il. poŝk. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

F-ino Natsu Simura kaj s-o Kosabura Simura, 49 Yanagimachi, Tojama (Japanujo), deziras interŝangi k. ĉ. l. pk. il. l., E.-S., anoncetojn, laboraĵojn de infanoj. [1]

S-o K. H. F. Hamelink, Hoefkade 556, den Haag (Holando), deziras korespondi pri ĉiu kun gesamideanoj ĉiulanda per il. pk., pm. bl. interŝangas ankau pm.

S-o Stefano Bencsik, Miskolcz, 27 str. Hutás (Hungar.) interŝangas pk. il. k. ĉ. l.

Fraŭlo Borys Burakow, Slawkowska 1, Nieswież (Polujo), deziras korespondi k. l. l. mondo per il. p., interŝangi bonajn poŝtmarkojn.

Kiu sendas al mi 50-100 sialandajn pm., ricevos saman kvanton da mialandaj. S-o Arnold Viikov en Kohla (Estonio).

S-oj Erich Schicht, stud. hem., kaj Alfred Schicht, instruisto, Seifersdorf apud Reichenberg, Bohemujo (Cehosl.), deziras interŝangi pm. k. ĉ. l.

Dum du monatoj mi danke ricevis pli ol 600 skribaĵojn kaj al mi tute ne estis eble respondi al ĉiuj. Kun ĉiuj mi interŝangos: monerojn, papermonojn, vidaĵojn kaj kun la miaj malnovaj korespondantoj ankoraŭ pm. kaj gazetajn. Vasil M. Ŝiŝkov, Tirmovo, str. „Šipka“ 1588 (Bulgariujo). [1]